# S.J. LEC

# NE KOMBITAJ PENSOJ

Trad. Jerzy Banacki

La Juna Penso - F 47340 Laroque Timbaut
Sept. 1973 - N° 93A

## Enkonduko

Stanisław Jerzy LEC (1909 - 1966), granda pola satiristo kaj poeto, majstro de la lapidara paradokso kaj filozofo, kultivis antaŭ ĉio la intelektan poezion , saturitan per skeptikaj moralistaj pripensoj.

Specialan disfamon akiris liaj aforismoj,epigramoj kaj sentencoj. Tradukoj de liaj verkoj (ĉefe de " Nekombitaj Pensoj") aperis en multaj landoj de la mondo.

Aforismojn de LEC citiŝ en siaj eldiroj la plej eminentaj filozofoj kaj politikistoj. Oni dediĉis al ili sciencajn seminariojn; ili eniris poreterne en la mondan trezorejon de la geniaj diroj. Hodiaŭ, post la jaroj, la verkaro de LEC perdis nenion el sia aktualeco.

Ĉi broŝuro entenas apenaŭ trionon de la tuta kolekto de la sentencoj titolitaj "Nekombitaj Pensoj".

Mi esperas, ke la internacia leganto, kiu ankoraŭ neniam renkontiĝis kun LEC, vere ĝuos legante, des pli ke, kiel diras la aŭtoro:
"Apetito venas kun la manĝado. Precipe se manĝas aliaj".

Jerzy Banacki

# Nekombitaj pensoj

1. Ne ĉiu salvo heroldas revolucion.
2. La fakto restos ĉiam nuda, eĉ se ĝi estus lastmode vestita.
3. Kio tenas nin sur tiu ĉi terglobo, krom la gravito?
4. Mi sonĝis terurajon: superkreskon de la burokratismo en ŝtato, kie oni antaŭ nelonge finlikvidis analfabetismon.
5. Detruante monumentojn, ŝparu piedestalojn. Ili ĉiam povas taŭgi.
6. Memoru pri tio, ke se diablo volas iun piedfrapi, ĝi faras tion neniam per sia ĉevalhufo, sed per sia hompiedo.
7. Kankro ruĝiĝas post la propra morto. Kiel ekzemplinda subtilo ĉe la viktimo !
8. El recenzo: "Tiun ĉi poeton karakterizis nobla malriĉeco de la pensoj".
9. Homo kun homo ne renkontiĝos, sed monto kun monto ĉiam.
10. Ĉu pro la fakto, ke mi ne kredas animon, mi ne posedas ĝin ?
11. Mi preferas surskribon "Eniro malpermesata", ol "Eliro ne ekzistas".
12. "Mi sentas, ke al mi kreskas flugiloj!" - diris muso. Nu, kaj kio sekvas, sinjoro vesperto ?
13. La unua kondiĉo por la senmorteco, estas ĝuste morto.

14. Konstitucio de la ŝtato ne povas rompi konstitucion de la civitano.

15. Se la mito kunpuŝiĝas kun la mito, estas vere reala karambolo.

16. Eĉ sur la trono foruziĝas pantalono.

17. Fenestron al la mondo oni povas kovri per gazeto.

18. Liberecon oni ne povas simuli!

19. Ne eblas ludi "Kanton de l'Libero" helpe de la perfort-instrumento.

20. Kiel puloj saltas pensoj de homo al homo. Sed ne ĉiujn ili mordas.

21. Koto kreas iufoje ŝajnon de la profundo.

22. Mi estas bela, mi estas forta, mi estas saĝa, mi estas bona. Kaj mi mem ĉion ĉi malkovris !

23. "Mi minacos al li nur per la fingro" - li diris, metante ĝin sur la ĉanon.

24. De tempo al tempo sonoriloj balancigas sonorigiston.

25. Alie odoras fojno por ĉevaloj kaj enamiĝintoj.

26. "Kiel oni devas konduti" - demandis min mia konato - "se oni trovas en sia hejmo amanton de sia edzino , kun fremda virino en la lito?"

27. Vi demandas min, bela sinjorino, kiom longe koviĝas miaj pensoj. Ses mil jarojn, ho mia ĉarmulino.

28. Ne parolu malbone pri la homo. Li subaŭskultas en vi.

29. "Kial" - mi demandis certan kritikiston - "vi skribis pri tio, kiel pri epokfaranta okazintaĵo, kiu posedos decidan signifon?"
"Pri kio?" - li demandis.

30. Transfuzo de la sango ofte okazas de poŝo al poŝo.

31. Dikuloj vivas pli mallonge. Sed ili manĝas pli longe.

32. Eĉ en lia silento estis lingvaj eraroj.

33. Se Dio hodiaŭ denove enlasus nin nudaj en la paradizon, certe nia nudeco estus tie eksmoda.

34. Jam la paragraf-signo mem aspektas kiel torturilo.

35. Neniam malfermu pordon al tiuj, kiuj malfermas ĝin eĉ sen via permeso.

36. Ne rakontu viajn sonĝojn. Ĉar eble Freud-istoj komencos regadon!

37. Ne subtranĉu branĉon sur kiu vi sidas, escepte se ili volas pendigi vin sur ĝi.

38. Eĉ masoĥistoj konfesas ĉion dum torturado. Pro dankemo.

39. Litero de la leĝo devus esti enigita en la alfabeton.

40. En la infero, la diablo estas pozitiva figuro.

41. Oni povus inventi punon de la vivdaŭra malliberigo, priseverigante ĝin per artefarita plilongigado de la vivo.

42. Rozoj odoras profesie.

43. "Kafeja intelektulo" - tio ne estas unusenca epiteto, oni devas ankoraŭ mencii el kiu kafejo.

44. Li similas al mi pedikon sur kalvaĵo. Ĉirkaŭe, multe da brilo - kaj tamen pediko.

45. Alarma sonorilo devas havi kuraĝan koron.

46. Mi vidis foje titanon teksoflikantan duonŝtrumpojn. Tio estis lia unua titana penego.

47. Pensoj de iuj homoj estas tiom malprofundaj, ke ili ne atingas eĉ i l i a n kapon.

48. Mi revas pri tia ankro, kiu tirus post si kontinentojn.

49. Plej fidele subtenas mitojn - dungitoj.

50. Ŝafo, kiu havis orfelon, ne estis riĉa.

51. Ventoj blovas tre diafane.

52. Ĉion oni devas dediĉi al la homo. Nur ne aliajn homojn.

53. Al Dio la dian, al imperiestro la imperiestran. Sed kion al homoj ?

54. Oni povas morti sur la insulo de S-ta Helena, ne estante Napoleono.

55. Ne estu snobo. Mensogu neniam, se la vero pli valoras.

56. "El unu kruco oni povus fari du pendumilojn" - diris malestime specialisto.

57. Ni dividiĝis per dioj, sed kiel ili dividiĝis per ni?

58. Nomi iun putino estas pli facila, ol esti putino.

59. Mi renkontis homon, tiom malmulte legintan, ke li mem devis elpensi citaĵojn de la klasikuloj.

60. Marionetojn oni povas plej facile ŝanĝi en pendumitojn. La ŝnuroj jam estas.

61. Brulantaj ŝtiparoj ne dislumigas mallumon.

62. Al instruiteco de la ĵonglisto devus necese aparteni nescio de la fizikaj leĝoj.

63. Ĉiu jarcento havas sian mezepokon.

64. Iu ajn fetoro, kiu batalas kontraŭ la ventolilo, konsideras sin kiel Donkiĥoton.

65. Ne ĉiu bumerango revenas. Pluraj elektas liberecon.

66. Ideon oni povas impliki ĝis fino.

67. Ĉu nudaj virinoj estas inteligentaj ?

68. Se du malamikoj havas komunan kontraŭulon, tio ankoraŭ pli ekscitas ilian reciprokan malamon, ĉar ĉiu el ili volas esti ununura venkinto de sia malamiko.

69. Malhelaj fenestroj donas iufoje tre klaran pruvon.

70. Kiamaniere ekzerci memoron por forges-scipovi ?

71. La tremoloj timtremas en ĉiu reĝimo. Al diablo! Sed ankaŭ en ĉiu verdiĝas.

72. Homo kun homo de multaj jarcentoj sammonologas.

73. Eĉ la vitra okulo vidas sian blindecon.

74. Ĉu licas preteriri la veron ? Jes, se oni ĝin antaŭigas.

75. Malnovaj klaĉoj naskiĝas kiel novaj mitoj.

76. Li ? Posedas enciklopedian nescion!
77. Ipsilono estas granda hometo!
78. Memoru, perfidu neniam veron! Perfidu veron!!
79. Vivi ne estas tro sane, ĉar kiu vivas tiu mortas.
80. Se ŝi ankoraŭ pli prokrastus la rendevuon, mi fariĝus Petrarko.
81. Ĉu homo ne scipovanta kalkuli, trovinte kvarfolieran trifolion, ankaŭ rajtas la feliĉon?
82. Mi volis diri al la mondo nur unu vorton. Ĉar mi ne scipovis fari tion, mi estiĝis verkisto.
83. Oni ne eniras en galoŝoj la animon de proksimulo. La pied-viŝo nenion helpas.
84. Salto m o r a l e, estas pli danĝera ol salto mortale.
85. Konsilo por verkistoj: En certa momento oni devas ĉesigi la verkadon. Eĉ antaŭ la komenco.
86. Falis sur lin ombro de la suspekto. Kaj li sin kaŝas en tiu ombro.
87. Ili alproksimiĝis al si tiel, ke restis jam loko por neniaj sentoj.
88. Nokte ne voku helpon. Vi povas veki najbarojn.
89. Optimismo kaj pesimismo diferencas nur per la dato de la mondofino.
90. Ne imageble, ke en tiu ĉi fajro, kiun elŝtelis Prometeo, oni brulmortigis Giordano Bruno-n!
91. Ĉu kanibalo manĝanta per la tranĉilo kaj forketo, signifas progreson?
92. Por pensado oni bezonas la cerbon, ne menciante jam la homon.
93. Iufoje tentas min diablo, por ekkredi Dion.
94. Oni povas retroturni la gurdon, sed ne melodion.
95. Neniu volas senti gisto-guston en la pasto, kiu dank' al tiu gisto elkreskis.

96. Ŝi? Eĉ okulisto ellegus en ŝiaj okuloj nenion pli ol tri dioptriojn.

97. El la paradizo oni forpelis ja nur Adamon kaj Evan, kaj kiel forlasis ĝin leonoj, agloj, simioj, puloj ktp ? Kaj eĉ pomoj?

98. Ĉerkokovrilo estas senornama flanke de la ĉerkouzanto.

99. "Aĥ, kiel mi volus esti ankoraŭfoje maljuna!" - diris juna mortinto.

100. Ĉiu balailo memforbalaiĝas malrapide.

101. Se kanibaloj elkraĉas viktimon kun abomeno, ĉu tio ofendas deliktulon?

102. Iuj tre volonte portus frigian ĉapon, se ĝi estus nevidebliga ĉapo.

103. Fundo ne ekzistas. Ekzistas nur obstakloj de la profundo.

104. Kiu verkisto rezignis propravole de genieco? Nur mi devis frue konsenti kun tio. Mi komprenis, ke al mi mankas la enuo-elemento.

105. Turniĝu ĉiam al la fremdaj dioj. Ili aŭskultos vin ekster la vico.

106. Senpenseco mortigas. Aliujn.

107. La gurdo muelos ĉiun melodion.

108. Plej malfacile ricevi veron, en la tempoj, kiam ĉio povas esti vero.

109. Mi iufoje hezitas manĝante sardinon, ĉar povas okazi, ke mi hazarde mordos ian Jonan el la biblio por la koboldoj.

110. Oni povas transiri al pozicioj de malamiko, restante sur la propraj.

111. "Ne elverŝu infanon kun la banakvo" - Ha, ha! - proverbo de la fuŝemaj plumbistoj.

112. Oni povas ŝanĝi religion, ne ŝanĝante Dion. Kaj inverse.

113. Fundo estas ĉiam fundo, eĉ turnita supren.

114. Vi demandas min, kiel ludis tiu virtuozo? En lia ludo estis io homa: li faris eraron.

115. Regulo: "Vivuloj konservu silenton en la tombejoj, se tion scipovas eĉ mortintoj."

116. Vundoj cikatriĝas, sed cikatroj kreskas kune kun ni.

117. Premsignoj de la dia fingro neniam estas identaj.

118. Ne ĉiu nokto finiĝas per tagiĝo.

119. Ĉu validas pilgrimado, se vojo kondukis pilgrimulon al alia celo ?

120. Estis ankaŭ tiaj martiroj, kiuj eĉ revenadis tra la kalvaria vojo.

121. Eĉ kiam oni ĉasas elefantojn, oni devas iufoje mortigi pulon.

122. Iu sodomiulo ekscitiĝis trafoliumante lernolibron de zoologio. Ĉu tiun ĉi libron oni devas konsideri kiel pornografian eldonaĵon ?

123. Kiam mi memstare malkovris pensojn, jam diritajn iam de grandaj filozofoj, tiu fakto ne kuraĝigis min, sed plimalgrandigis ilin. Ĉu mikro-, aŭ megalomanio ?

124. Ĉiam la malbona povas iĝi bona. Kiam Ikaro kaj Dedalo falis teren, ili fariĝis anĝeloj. Ricevinte proprajn flugilojn, ili povis flugi ĝissate.

125. Kion mi kredas ? Dion, se li estas.

126. Iufoje oni devas silentiĝi, por esti aŭskultata.

127. Vizaĝo de la malamiko terurigas min tiam, kiam mi vidas kiom multe ĝi similas al la mia.

128. Lernu la lingvojn. Eĉ ne ekzistantajn.

129. Ne ŝmacu per okuloj!

130. Senpova furiozeco faras miraklojn.

131. Homoj ne traktas serioze ridindaĵojn. Kvazaŭ oni mortpafus iun el revolvero en formo de foceno kaj la mortigito ne volus tion agnoski.

132. Malkovro de Ameriko ne estas merito de amerikanoj. Kia honto!

133. Kiu en la infero havis epoletojn - ankaŭ en la ĉielo ilin portas.

134. Kio fariĝas kun diablo, kiu ĉesas kredi Dion?

135. Sur la kolo de ĝirafo, pulo komencas kredi senmortecon.

136. Mi sonĝis reklam-sloganon de la kontraŭgravediĝaj rimedoj: "Nenaskitoj vin benos!"

137. Ne familiariĝu kun vi mem!

138. Kiel vento scias, kiun direkton blovi ?

139. Atentu, por ne fali sub radon de ies feliĉo.

140. Ne kreu diojn, je la propra simileco!

141. Ŝlosilo de la situacio ofte troviĝas en la seruro de la najbaro.

142. Ĉu fiŝoj, kiuj trafluas maŝojn de la reto, suferas pro komplekso de malsupereco ?

143. Kia maldelikateco, ludi sur ies tibio melodion,kiun mortinto malŝatis.

144. Li faris krimon: li mortigis homon! En si mem.

145. Ĉiuj niaj apartaj fikcioj kreas unu komunan realecon!

146. Idealistoj deziras materiigon de la spiritoj.

147. Heroooj de la malnovaj mitoj estis preskaŭ nudaj, heroooj de la hodiaŭaj estas tute nudaj.

148. Homo, kiu estas geniulo kaj ne scias pri tio,probable ne estas genia.

149. Ju pli riĉan fantazion havas homo, des pli malriĉa li sin sentas.

150. Eĉ leonan parton de la leono iu voros.

151. La fakto,ke li mortis,ne estas ankoraŭ pruvo, ke li vivis.

152. Eĉ anĝeloj havas siajn satanojn, kaj satanoj siajn anĝelojn.

153. Se vi volas kaŝi vizaĝon - eliru nude.

154. Nudpiedulo ne surpaŝas rozojn.

155. Eĉ la malpezeco havas sian specifan pezon.

156. Oni povas malfermi buŝon pro raviteco, por fermi ĝin pro oscedo.

157. Propra morto estas por ĝentilhomo nenia ekskuzo!

158. Okazas ankaŭ, ke standardisto ŝvebas aliflanke ol la standardo.

159. Oni bezonas ankaŭ sobriĝejon por homoj ebriaj pro la feliĉo.

160. Eĉ manko de fruktoj naskas fermentojn.

161. "E pur si muove!" - ekkriis furioza ekzekutisto post la ekzekuto.

162. Eble ni estas nur ies rememoro ?

163. Truon en la penso estas malfacile ŝtopi per la realeco.

164. Perspektivo - ĉarma afero: ekvidi malamikojn tiom malgrandaj!

165. Ventoj ŝanĝas vojmontrilojn.

166. Abstrakto havas plej multajn formojn.

167. Jen kuraĝa verkisto! Li metis punkton post la neskribita frazo.

168. Eĉ la frenez-jako devus esti konforma al la frenezo.

169. Ne ĉiu scipovas danci laŭ la muziko de la futuro.

170. Ĉiuj dioj e s t i s senmortaj.

171. Li havis animstaton de fantomo, kiu ankoraŭ neniun viziis.

172. Eĉ hundo en la ĉefurbo bojas pli centre.

173. Spirito de la tempo timigas eĉ ateistojn.

174. La vivo forrabas al homoj tro multe da tempo.

175. Atentu, por ke ne kaptu vian gorĝon ies kortuŝo.

176. Iufoje noktoj estas tro mallumaj por ekvidi ilin.

177. Plej ofte tie estas elirejo, kie estis enirejo.

178. Ho, soleco, kiel vi estas trologata!

179. La tempo estas senmova. Nur ni moviĝas en ĝi en la malĝusta direkto.

180. Se via malamiko faros falsan paŝon - atentu! Vi dancas laŭ la sama melodio.

181. Certaj karakteroj estas nefleksеblaj, sed distireblaj.

182. En batalo de la ideoj pereas homoj.

183. Kiu ne posedas konsciencon, tiu devas tion kompensi per ties manko.

184. Al homoj taŭgus iufoje "la tago libera de la vivo".

185. Al pluraj nuloj ŝajnas, ke ili estas elipsoj, sur kiuj la mondo turniĝas.

186. Kial mi skribas ĉi mallongajn epigramojn ? Ĉar al mi mankas vortoj.

187. Diru al mi kun kiu vi enlitiĝas, kaj mi diros al vi pri kiu vi sonĝas.

188. Kiam ni lanĉos penso-obuson ekster la limojn de la intelekto ?

189. Ĉiu arbusto povas esti flamanta, se vi sukcesos ekbruligi ĝin per via imago.

190. Oni devas havi multe da pacienco por lerni ĝin.

191. Li sin kaŝis post la lango, kiun li montradis al la mondo.

192. Havi samaspektulon, memmortigi lin, kaj plu vivi kiel li - kiaj eblecoj por la skizofrenio!

193. Figuroj plej ofte estas el ŝtono.

194. Eĉ la postaĵoj portas maskojn. Pro kompreneblaj kaŭzoj.

195. Memoru: postenon havas ĉiam nur ĉasisto, neniam ĉasbestoj.

196. Malbonŝanculoj, kiam jam dormas, sonĝas ke ili oscedas.

197. Min ĉiam timigis ne ŝargitaj karabenoj, kiujn oni uzis por frakasi kapojn.

198. Ŝtorma estas Maro de Indiferenteco.

199. Ju pli malgrandaj civitanoj, des pli granda ŝajnas la imperio.

200. Plej facile devojiĝi en la arbarego, kiam oni ĝin forhakos.

201. Neado estas pozitiva elemento de la tuto.

202. Maljustico estas ĉiam en la ĝustaj manoj.

203. Kion oni ne povas imagi al si, tion oni povas al si ofte aĉeti.

204. Eĉ por la hezito oni devas fari decidon.

205. Pripensu, antaŭ ol vi pripensos!

206. Ĉu surrealismo ĉesas ekzisti, se ĝi estas realigita?

207. La moraleco estas afero konvencia aŭ tuj pagenda.

208. Multaj miaj amikoj fariĝis miaj malamikoj, multaj miaj malamikoj amikiĝis kun mi, sed indiferentaj restis al mi fidelaj.

209. Ĉu sufiĉos vortoj por satigi ĉiujn buŝojn ?

210. Ni mem blovu en niajn velojn!

211. Permesu eĉ al la blinduloj ludi la blindludon!

212. En ĉiu birdotimigilo dormetas ambicioj de la teruro.

213. Eĉ malplena sigelita koverto entenas sekreton.

214. Al la celo? Tie oni eliras.

215. Estas malbele suspekti iun, se oni havas plencertecon.

216. Ne scipovante fremdan lingvon, vi neniam komprenos la silenton de alilandanoj.

217. Deformas nin formuloj.

218. Se oni povus ankoraŭ poroferan virkapron melki !

219. Havi tranĉilon ĉe la gorĝo de kontraŭulo - danĝera momento!

220. Domaĝe, ke mi jam ne vivos en la tempo, kiam montriĝos, ke nia tempo-kalkulado estis iluzio. Kaj ni tute ne maljuniĝadis.

221. Kaj kio sekvas el la fakto, ke la vivo trapasas, se ĝi estas tiom multekosta?

222. La lasta libro de X., estas romano kun ŝlosilo... ĉe la pordisto.

223. Se la homo konus mezuron de sia grandeco, li ne devus plie kreski.

224. La stulteco ne liberigas de la pensado.

225. Mi kredas, ke la homo iam kreos homunkulon, artefaritan homon, sed mi petegas je la amo de Dio, li ne ripetu Lian eraron, kaj ne kreu ĉi homon je la propra simileco.

226. Ne sufiĉas paroli kun senco, oni devas paroli kun homoj.

227. Kiam blovas neniaj ventoj - eĉ la preĝeja turkoko havas karakteron.

228. Mi ne povas bruli pro indigno, ekaŭdante nomon de Herostrato, ĝis mi ne ekvidis la arkitekturon de la templo de Artemisa en Efezo.

229. Ne el ĉiu ovo elkoviĝas Kolumbo.

230. En la ĝangalo oni portas sturmkaskojn kovritajn per reto,en kiun oni enplektas plej diversajn maskajn herbaĉojn. Mi portas frigian ĉapon prikudritan per la arlekenaj sonoriloj.

231. Atentu satiristoj kun nasko de la ideoj! En la filmo de R. Clair "Vivu la libereco" de 1931, refreno de unu el la ironiaj kantoj tekstas jene: "Le travail c'est la liberté", kaj en 1940 sur la pordego de Auschwitz-koncentrejo ekaperis la surskribo "Arbeit macht frei!"

232. "Mi volus, ke la mondo estu Grand Guignol!"
"Vi estas sadisto!"
"Ne! Nur tie ĉio ĉi estas kvazaŭa!"

233. Mi ŝatas tiujn, kiuj estus, se oni eĉ ilin ne naskus.

234. Se la mito ŝanĝiĝas en la realecon, kiu venkas - ĉu materialistoj aŭ idealistoj ?

235. Oni avertadis min antaŭ X-ulo: "Li ne estas socie konscia!" Mi ekkonis lin. Tre homigita.

236. Ĉiam kiam la homo komencas heziti, li faras tian stultaĵon, kia lin ekravos.

237. Proverboj al si neas. Kaj ĝuste tio estas la popola saĝo.

238. Neniu Torkemado eltiros el la homoj tiom multe da sekretaj pensoj kiom la gloravido.

239. Oni povas fermi okulojn por la realeco, sed ne por la rememoroj.

240. Mi vidas viajn pensojn: "Ex oriente lux, ex occidente luxus!"

241. Kiam ili ekkrios: "Vivu la progreso!" - ĉiam demandu: "Kia progreso?"

242. Strange, kiel malfacile estas elvoki eĥon en la plej malplenaj kapoj.

243. "Nur la meteoro" - diris malestime kandelo.

244. Krimo ne postulas imposton.

245. Ili prenis lin kiel iun alian, sed ili lojale redonis lian propran kadavron.

246. Virkoko prikokerikas eĉ ĉi matenon, kiam ĝi iras en la buljonon.

247. Ĝuste post Kreo de la Mondo kreiĝis multaj nekreeblaj objektoj.

248. Domaĝe ke en la paradizon oni veturas per la ĉerkoveturilo!

249. Suferi pro kordoloro kaj ne esti lirikisto? Por kio?

250. Junecaj krimuloj ne posedas garantiitan estontecon. Ili povas ankoraŭ fariĝi honestaj homoj.

251. Reformo de la kalendaro ne mallongigos la gravedecon.

252. En sia modesto li konsideris sin kiel paperŝmiriston, kaj dume li estis denunculo.

253. Ĉu mi kredas? Nur Dio tion scias.

254. Ne estas malfacile diri: "Mi estas!" Oni devas esti.

255. Ĉu inter kanibaloj troviĝas vegetaranoj?

256. Mia cerbo estis tro laca por krei ian falsan penson.

257. Homoj, kiuj havas nenion komunan kun arto, devus havi kun ĝi nenion komunan. Ĉu ne simple ?

258. Ne ĉiuj Habeloj povas posedi proprajn Kainojn. Ili devas kontentiĝi per la kolektivaj.

259. Mi ne scias, ĉu la fiŝo estus plu muta, se ĝi havus tiom da sekretoj, kiel mi.

260. Oni povas esti virtuozo de la falsa ludo.

261. Oni ĉiam devas gardi sian personecon. Ĉevalo sen la ulano estas ĉiam ĉevalo, sed ulano sen la ĉevalo estas nur homo.

262. Aĥ, kia estis turmento! Ĉirkaŭe nur la nudaj virinoj, vestitaj ĝis la kolo.

263. Post certaj rememoroj ne sufiĉos nur la malvarma duŝo, oni devas preni,antaŭ ĉio, veran varman banon.

264. Puritanoj devus porti du figajn foliojn sur la okuloj.

265. Tiu, kiu vekiĝas en la lito, en kiun li ne enlitiĝis, tuj kontrolu sian identecon.

266. Li rompis al si vivon! Kaj nun posedas du apartajn , tre agrablajn vivojn.

267. Diversaj pensoj moviĝas en la kapo. Kelkaj eĉ forlasas ĝin.

268. Mi estas scivola, ĉu ia besto, rigardante nin,pensas: "Ecce homo!"

269. Interjekcio,kiu fleksebliĝis,ŝanĝiĝas en demando-signon.

270. Monumento povas esti bonega sunhorloĝo. Eĉ post kiam ĝi estas detruita,oni scias kioma horo sonis.

271. Klaboj estis ludiloj. Hodiaŭ komprenus tion eĉ la klabmortigito.

272. Ĉiu tordas al si ŝnuron sur la propra kolo en konvena koloro.

273. Eĉ la animo devas esti de tempo al tempo je la dieto.

274. Oni devas ĉiam komenci de la fino.

275. Ne demandu Dion pri la vojo al ĉielo, ĉar Li montros al vi la plej malfacilan.

276. Niaj vidpunktoj sin kovras. Temas nur pri tio, kiu kiun kovras.

277. Bona klaĉo devus neniam veriĝi en cent procentoj.

278. Protezo de l'animo devas esti nevidebla.

279. Ni atentu! Neglektata de ni analfabeto povas starigi punkton super i.

280. Ni komprenas ĉion,kaj tial ni povas nenion kompreni.

281. Pezon de la problemo oni kalkulas brutte.Kune kun ni.

282. Kiel traduki ĝemojn en la fremdajn lingvojn ?

283. Frazoj estas kutime dividitaj - inter la fortuloj.

284. Ŝi demandis min ĉarme:"Probable estas tre malfacile elpensi ĉion el la kapo, kiel vi sinjoro?" - "Malfacile" - mi respondis - "sed al mi ŝajnas, ke estus ankoraŭ pli malfacile elpensi ĉion el la piedo".

285. Vojmontriloj staras sur la loko.

286. "Ne mortigu!" en la Dekalogo - tio tekstas kiel admono, kaj ja ĝi estas malkovro!

287. Oni povas iun kondamni je la forgeso, sed la verdikton oni devas plenumi je la memorantoj.

288. "Pli bona morgaŭo" - ne asekuras antaŭ la "ankoraŭ pli bona postmorgaŭo".

289. Iutempe homo sin sentas kiel "amen", kiu ne konis preĝon.

290. Nur poeto povus pretigi demandaron por la Dio.

291. Troglodito ne estis troglodito. Li staris sur la nivelo de la tiama civilizacio.

292. Ĉio estas nur iluzio. Evidente eĉ la antaŭa frazo.

293. Se vi eksaltos de ĝojo, atentu por ke iu ne forprenu teron el sub viaj piedoj.

294. Ŝajnas al mi, ke certe mirigus vin bovino angle parolanta. Sed kredu al mi,ke post kelka tempo vi bedaŭrus ĝian neoksfordan akcenton. Evidente se vi estus sperta pri tio.

295. "Pluvas supren" - konfesis homo pendigita je la piedoj. Oni alskribis: "Konforme al la vero".

296. Kiu demandas tezojn kaj antitezojn, ĉu ili volas fariĝi sintezo.

297. Du paralelaj linioj renkontiĝas en la senfineco - kaj ili tion kredas.

298. Nia nescio atingas pli kaj pli malproksimajn mondojn.

299. Patrujamo ne konas fremdajn limojn.

300. Mi preferus, se Davido mortigus Goljaton per harpo.

301. Demosteno alparolis senĝene kun ŝtoneto en la buŝo. Ĝi estas obstaklo?

302. Ridu ĝis la larmoj! Por la optimistoj kaj pesimistoj.

303. Fingroj de la servistoj devus postlasi premsignojn de la sinjoroj.

304. Kio lamas - tio iras.

305. Ni observas interesan fenomenon: balbuton, kiel homan interkomprenilon.

306. Esti sia propra ministro de la internaj aferoj!

307. Neniam tono revenas al la kordo.

308. Homoj ne estas egoistoj. Neniu portas funebron post sia morto.

309. Sukceso de Heine ! Fariĝi por la tuta mondo konata "nekonata poeto" !

310. Kia snobismo ! Li volis iĝi Granda Eŭnuko.

311. Estas tiuj kiuj neniam esperis, kaj tiuj kiuj ĉiam perdas esperon.

312. Estas terure, se unu sinjoro posedas grandegan kvanton da sklavoj. Mi pensas tamen, ke ne estas pli bone, se la sklavo posedas multajn sinjorojn.

313. Multaj el tiuj, kiuj antaŭis sian tempon, devis atendi ĝin en la ne plej oportunaj ejoj.

314. Mi vidis homon transverŝantan el la malplena en la malplenan. Mi demandis lin, kiacele li faras tion. "Mi estas modernigita klepsidro".

315. Atentu por ne krei pro malatento ion neforgeseblan. Kiom da homoj devos plenkonscie dediĉi sian vivon por tion tute ekstermi.

316. Analfabetoj devas dikti.

317. Kiam ĉio devas esti ĝusta, devas io esti malĝusta.

318. Multaj homoj ne subskribis "Liston de la ĉeesto en la mondo".

319. Idealoj ne estas por idealistoj.

320. En certaj vortaroj forestas la honorvorto.

321. Kiam fatamorgano montriĝos realo, postulu la rekompencon.

322. "Mi estas filo de la suno!" - diris al mi efelido sur la nazo de sinjorino X.

323. La vera saĝo ne forlasas kapon.

324. Kondamnito neniam alkreskas al pendumilo.

325. Certaj frandemuloj volus, ke la fiŝo plaŭdu en la graso, en kiu ili ĝin fritas.

326. Eĉ la vortoj sen la garantio estas alte notataj.

327. Aĥ! Fungokolektado kun la ĉaspelo!

328. Ni interrigardis en niajn okulojn, kaj mi vidis nur min, kaj ŝi vidis nur sin.

329. Ne estas malfacile finkanti melodion, des pli ke la refreno kutime ripetiĝas.

330. Kiam atingis ĝustatempe la celo mem la celon ?

331. Homamaso krias per unu granda buŝo, sed manĝas per miloj da malgrandaj.

332. Ĉu kanibalo rajtas paroli en la nomo de formanĝitoj de si mem?

333. Spirblovante sur la malvarman, oni povas malvarmigi propran fervoron.

334. Foriru satano! Diablino estas ĉe mi.

335. Leĝoj de la fiziko estas tradiciaj leĝoj de la naturo.

336. Estas ankaŭ tiaj Robinsonoj, kiuj rompiĝis veturante el sia senhomejo, kaj tragike albordiĝis en la hom-plena mondo.

337. Eble puraj manoj devus esti pli longaj ?

338. Certa saĝulo ĉiam riverencis al reganto tiamaniere, ke li povu samtempe montri pugon al la servistaĉaro.

339. Unuj volas kompreni tion,kion ili kredas, aliaj kredi tion, kion ili komprenas.

340. Sumo de la anguloj pro kiuj mi sopiras, estas certe pli granda ol 360.

341. Aĥ, scii privatan adreson de Dio.

342. Ideo: posedi ĝin !

343. Parolu saĝe, malamiko subaŭskultas.

344. Ni postulas okhoran tagon de la pensado!

345. Celtrafa pafo: Ne trafi homon.

346. Kiam timo estas pala, ĝi bezonas sangon.

347. Homplenigi mondon estas facila. Senhomigi mondon estas facila. Do, kie estas malfacileco ?

348. Eĉ pulo ne saltas pro ĝojo.

349. Momento de la malkovro de sia sentalento, estas brilo de la genio.

350. Ne antaŭnomu la aferon, se vi ne konas ĝian nomon.

351. Ekzistas parodioj de la neekzistaĵoj.

352. Ne veku asociadojn, se vi ne scipovas ilin dormigi.

353. El la genia penso oni povas forigi ĉiujn vortojn.

354. Mense sendependaj estas nur geniuloj kaj malsaĝuloj.

355. Sezamo, malfermiĝu - mi volas eliri!

356. Ĉu vi aŭdas tiun ĉi balbuton? Jen korusoj de la konsonantoj, post ekstermo de la vokaloj.

357. El la vico de la nuloj estas facile krei ĉenojn.

358. Eĉ happy-end estas nur fino.

359. Multaj aĵoj ne naskiĝis pro la neebleco nomi ilin.

360. Ne detruu Bastilojn, antaŭ ol oni konstruos ilin.

361. Gardu vin, kiam senflugiligitoj disvolvas flugilojn.

362. La Franca Revolucio montris laŭ la ekzemploj, ke malvenkas tiuj, kiuj perdas kapojn.

363. Ĉu oni konkludis el la homa anatomio, por kiaj celoj estis kreita la homo?

364. Memoru, ke la prezo, kiun oni devas pagi por la libereco,malaltiĝas kiam kreskas debito.

365. Tiu surpaŝas la rozojn, kiu tretas la bedojn.

366. Post perdo de la dentoj estas onidire pli granda senĝeno de la lango.

367. Fiŝo iĝas kulpa, kiam ĝi englutas hoketon: fremda propraĵo.

368. Inter la nanoj furiozas de tempo al tempo epidemioj elephantiasis.

369. Estas homoj profunde kredantaj,ili atendas nur religion.

370. Ni ne konstruu azilojn por la mensa mizero.

371. Memoru, ĉio gravitas malsupren sur tiu ĉi tero.

372. Simple oni ne povas kredi tion, ke la detaloj ne estas konataj de ĉiuj.

373. Du gilotinoj staris unu apud la alia. Ekzekutistoj konkuris, kies propra kapo forfalos pli malfrue.

374. Ebeno de la interkonsento - ideala batalkampo.

375. Kiu aŭdas kiel la herbo kreskas? Falĉistoj.

376. "Pensoj estas liberaj de la dogano?" Se ili ne transpasas limojn.

377. La neforpasantaj valoroj havas bedaŭrinde nenian limdaton de la realigo.

378. La interŝanĝa justeco - okulon pro okulo, denton pro dento - atingis tempopase nivelon de la aĉeta justeco.

379. Homo - persona non grata.

380. La moralo falas sur la pli kaj pli oportunajn litsternaĵojn.

381. Eĉ la fremda analfabetismo malfaciligas skribadon.

382. Ne perdu la energion naskitan de la morala rulfalo.

383. La realon oni povas ŝanĝi, la fikcion oni devas denove elpensi.

384. Kiel ekkonas liberecon tiuj, kiuj ĝin neniam konis? Ili povas suspekti en ĝi ankoraŭ unu plian maskon de la tirano.

385. Kiom da diluvoj estis sen Noa !

386. Mi vidis flugantajn kaĝojn: en ili estis agloj.

387. Iri tutan vivon konsekvence al la celo oni povas nur tiam, kiam ĝi konstante malproksimiĝas.

388. Oni devas ĉiam denove lerni skribi kaj legi. Ĉu legi kaj skribi?

389. Ekzistas ideala mondo de la mensogo,kie ĉio estas vera.

390. El la ekrido naskiĝas rido, sed nur el ĝi naskiĝas rideto.

391. Ne okazintaj faroj ofte kaŭzas katastrofan mankon de la sekvoj.

392. Oni devas popularigi elitismon!

393. Triumfo de la scio pri l'homo - aktoj de la Sekreta Polico.

394. Sur vojo de la plej malgranda rezisto, fiaskas la plej fortaj bremsoj.

395. Ni estu diskretaj,ni ne demandu homojn,ĉu ili vivas.

396. "Falu - leviĝu"- apenaŭ la rekrutotempo.
"Pereu - resurektu" - la ĝusta vivo.

397. Ne ĉiu griza maso havas ion komunan kun la cerbo.

398. Eĉ la polica gumbastono estas vojmontrilo.

399. Aktoro devas havi ion direndan,eĉ se li mutrolas.

400. El la rompita spino elkreskas psika ĝibo.

401. Por kio la vastaj horizontoj, se plej ofte oni povas ilin malkovri nur en la plej mallarĝa rondo.

402. Granda aktoro ĝuste dank'al la ŝminko, peruko aŭ artefarita nazo, akiras propran vizaĝon.

403. Mi vidis grandajn aktorojn, kiuj rolis sin mem. Ĝuste tiam mi rimarkis kiel malgrandaj ili estus,se ili ne estus tiel grandaj.

404. Mondo de la dramoj de Ipsilono estis fermnajlita per la scenejaj tabuloj.

405. Preterpasu la celon nur en sekura distanco.

406. Eksplua to de la homo per la homo? Do, homa.

407. Iuj malsanas pro trokresko de la politikaj glandoj.

408. La plej sangoplena tragedio estas tiam,kiam la sango surverŝas spektantojn.

409. Eĉ la mekanismo de la diktaturo ne perpetuum mobile.

410. Se la animalo mortigus antaŭpense, tio estus la homa reflekso.

411. El unu sistemo ni longe ne liberiĝos: el la suna.

412. Ĉiu spektanto alportas teatren,sian propran akustikon.

413. Panem et circenses! Tiam la pano devas esti ĉiam pli blanka kaj olimpikoj ĉiam pli sangoplenaj.

414. La vera aktoro,kiu adiaŭis scenejon, ĝis fino de la vivo rolas jam nur la homon.

415. Hamleto devus jam fariĝi Krezo. Kiu ne aldonadis de jarcentoj siajn tri groŝojn al lia monologo!

416. Forto de teatraĵo: ĝia heroo povas esti poltrono.

417. Aktoroj forlasas scenejon post finludo de la rolo. En la teatro.

418. Ofte farson de la realo povas redoni sur la scenejo nur tragedio.

419. Verkistoj, ne per inko, per sango oni devas skribi! Sed ne per la fremda.

420. Kiel ofte ni ludas komedion, ne esperante aplaŭdojn.

421. Ne estis malfacile naskiĝi al la greka tragedio - ĉe tiom maldiskreta koruso.

422. Nur la ĉiama nesatigeco de la poetoj povas satigi literaturon.

423. Plagiatistoj dormas trankvile. La muzo - virino malofte malkaŝos, kiu estis la unua.

424. Multaj homoj travivas tragedion. Ne por ĉiu tamen skribas ĝin ia Sofoklo.

425. Decidan rolon en tiu teatraĵo ludas politiko. Kaj malsukcesigas ĝin.

426. Kiom da grandiozaj tragedioj unu aplaŭdo ŝanĝus en komedion!

427. Gardu vin de la temoj, de kiuj oni ne povas forkuri!

428. En ĉiu lando alie tekstas Hamlet-demando.

429. Tiu,kiu naskiĝis kiel klasikulo,ne mortas. Oni forgesas lin.

430. Oni ne devas dispeli la enuon per la policaj fortoj!

431. Tiu verkisto diris tute novmaniere kaj originale: "Mi volas pisi!"

432. La plej grandaj verkoj de la geniaj kreintoj eniĝos en la koron de unu homo. Por la teatraĵetoj de fuŝuloj tro malmulte da loko sur la grandaj scenejoj.

433. Kiu kiel unua komprenis spritaĵon, tiu havas ankoraŭ multe da tempo por ŝajnigi, ke li ne komprenis ĝin.

434. Strange: "filozofion de la malespero" plej timas optimistoj.

435. Satiristoj liberiĝu de la vortoj, parolu la nombroj!

436. Opero ne elprofitis siajn eblecojn; ne ekzistas ja tia stultaĵo kian oni ne povus elkanti.

437. Satiro ne koncernas aĵojn, kiuj mem estas ridindaj.

438. Kiu travivis tragedion, ne estis ĝia heroo.

439. En la spegulo de la parolo ofte reflektiĝas nudaj homaj generiloj.

440. Diris mortinto: "Mi ne estis ekzistencialisto!"

441. Principo: al aktoro-balbutulo estas malpermesite roli balbutulon.

442. Ne unu fera repertuaro devus fini sian ekzistadon inter la ferrompaĵoj.

443. Iufoje ŝajnas, ke aferoj de dioj kaj homoj troviĝas en la manoj de iu tria.

444. Du nigraj karakteroj, sed kiel diferencas la koloro!

445. Nekrologo estus bonega vizitkarto!

446. Pli alta speco de la pago-klako: tiuj, al kiuj oni pagas por ne klaki.

447. Titolo: Ses personoj fuĝas antaŭ la aŭtoro.

448. Vojo al perfekteco de la arto: elimino. Sed ne kreintoj.

449. Estu realisto: ne diru veron.

450. Homo en la propra vivo ludas apenaŭ malgrandan epizodon.

451. Iufoje laŭroj enradikiĝas en la kapo.

452. Tragikecon de la epoko esprimas ĝia rido.

453. Ili ŝtonumis lin per monumento.

454. Historiaj materialoj devus esti facile brulemaj.

455. Kun Sokratoj oni trinkas "interfratiĝon" per cikuto.

456. Aliaj priridindigis ĉion kaj mi malmerite kolektas laùrojn de la satiristo.

457. Estas teatraĵoj tiom mizeraj, ke ili ne povas forlasi scenejon.

458. Naturalismo en certaj teatroj eksterordinara! Eĉ la piedaj tukpecoj fetoras el la scenejo. Nur la homoj ne estas veraj.

459. Ĉio jam restis skribita,feliĉe ankoraù ne ĉio pensita.

460. Regado pli ofte transiris el manoj al manoj, ol el kapo al kapo.

461. Mi observas ĉi verkiston atente, de Homero komencinte.

462. Kaj eble batalo de du Hamletoj - kiu devas esti , kaj kiu ne?

463. Fojno en la kapoj de certaj poetoj probable ne malbone servas al Pegazo.

464. Tio sukcese trapasis tempoprovon ? Komuniki kian!

465. Pozitivajn heroojn oni ne devas krei,sufiĉas nomi ilin.

466. Post certaj literaturaj revizioj,restas el la reviziaĵo fakte tre malmulte.Ĉion forprenis reviziintoj.

467. Eble formiĝos arto, kiu sen vortoj kaj eĉ sen gestoj, per nura rigardo permesos kompreni travivaĵojn de la nacio.

468. Mi rimarkis, ke homoj ŝatas tiajn pensojn, kiuj ne devigas ilin pensi.

469. Saĝaj pensoj saltas el la kapo, kiel Palasa Atena, belaj pensoj - el la ŝaumo kiel Afrodita.

470. La plej teruraj estas personaj aferoj de la neekzistantaj homoj.

471. Senmorta verkisto mortas en siaj epigonoj.

472. Pri la epoko diras multe pli la vortoj, kiujn oni ne uzas, ol tiuj, kiujn oni trouzas.

473. Kion unu poeto diras pri alia poeto, tion oni povas diri estante neniu el ili.

474. Homoj kreskas kaj mortigas sin pro tio, kiu estas pli alta.

475. Oni povas juĝi lin nur en negativaj superlativoj.

476. La arto antaŭenmarŝas, kaj post ĝi gardistoj.

477. En certaj fontoj de la inspiro Muzoj lavas piedojn.

478. Ĉefverkon komprenas eĉ la stultulo. Sed kiel malsame!

479. Ni kronu fruntojn nur al tiuj, kiuj posedas ilin.

480. Kiam politikaj fabloj rilatas al animaloj - probable ne porhoma tempo.

481. Ne ekzistas novaj direktoj, estas unu: de la homo al la homo.

482. Ŝajnus ke estas nenio pli sorbiva ol la publiko kun malplenaj kapoj!

483. Ni ŝatas, ke nia interna voĉo aloreligas nin ekstere.

484. Kiel ekkoni la historiajn tempestojn? Poste ankoraŭ longe doloras ostaro.

485. Profundon oni povas imiti per la koloro.

486. Verkisto, kiu ne profundiĝas, ĉiam sin tenas sur la surfaco.

487. Kiam la pravoj estas facile rompeblaj, rigidiĝas la pozicio .

488. Kiu trovis eĥon , tiu ripetiĝas.

489. Rikoltu laŭrojn! Sed ne el la fremda kapo.

490. Krei mitojn pri si mem, ne alie komencis dioj.

491. Artisto, kiu ne portretis kriplan reganton kiel heroon, ne estis realisto.

492. Ni staras iufoje super la abismo kiel antaŭ la sceneja balustrado kaj ni pensas, ke nur la publiko ie enprofundiĝis.

493. Por ke la arto estu realisma, ĝi devus antaŭe deformi la homon.

494. Ĉu pensado estas socia funkcio, ĉu ĝi estas funkcio de la cerbo ?

495. Ni forlasu la vojon de la Justeco! Ĝi estas blinda.

496. Iufoje la verko povas elekti: aŭ fariĝi la aŭtor-verko, aŭ la artoverko.

497. Alproksimiĝante la veron, ni malproksimiĝas de la realo.

498. Kutime, ariergardo de la malnova avangardo estas avangardo de la nova ariergardo.

499. Mi sentas, ke mi ĉiam ludas dramajn epizodojn en ia granda farso.

500. Aĥ, se ni povus vidi vivon kaj ne situaciojn!

.---==0==---.

Gérant & imprimeur: C.Baudé, F 47340 Laroque Timbaut ---
Commission paritaire de presse ............n° 39 863 ---